

# HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO

Finfine ĝi ekzistas! Dankon al la du aŭtoroj Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer! Dankon al ĉiuj, kiuj ilin helpis kaj subtenis!

Kion ni havis ĝis julio 2015 por orientiĝi en la sovaĝa arbaro de nia 125-jara literaturo? Praktike, nur kvar librojn:

– *Enciklopedio de Esperanto* de Ivan Ŝirajev, eldonita en 1933. 599 paĝoj. Informlibro, en kiu «Esperantistoj ... povus ... trovi koncizajn kaj ĝustajn sciigojn, necesajn al ili pri kio ajn rilatanta al la Esperanto-movado». Pri «kio ajn», do ankaŭ pri la esperanta literaturo ... ĝis 1933.

– *Esperanto en Perspektivo* de Ivo Lapenna, Ulrich Lins, Tazio Carlevaro. «Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo». Eldonita de UEA en 1974. 844 paĝoj. La tre utila enciklopedia verkaĵo enhavas ankaŭ kelkvortajn informojn pri la literaturo, ĉefe nomojn, titolojn kaj aperdatojn ... ĝis 1974.

– *Ordeno de Verda Plumo* de Josip Pleadin. Grafokom. Ĝurđevac. 2006. 272 paĝoj. Utila leksikono pri personoj verkitaj en Esperanto, kun malmultaj literaturaj analizoj.

– *Concize Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto, 1887 - 2007* de Geoffrey Sutton. Mondial, New York. 728 paĝoj. Utila libro en angla lingvo, juĝanta la esperantan literaturon laŭ kriterioj anglaj.

Ni aldonu al tio ĉi la multajn, sed pli-malpli dubajn kaj partiajn informojn, ĉerpeblajn el Interreto.

De nun ni havas veran orientilon, kies utilo ŝajnas tiel evidenta, ke oni jam komencis ĝin nomi akronime: «HEL». Ĉi tiu HEL,


*Historio de la Esperanta literaturo*, havas 748 paĝojn 17-oble-24-centimetrajn. La volumo estas solide bindita. La tipografio estas klara kaj eleganta. La bindaĵo estas deca kaj verda. La multaj nigra-blankaj internaj ilustraĵoj estas tiel precizaj kiel eblas en libro relative malmultekosta. La lingvaĵo estas senerara, sobra kaj agrabla. Ne mirinde: Carlo Minnaja, unu el la du aŭtoroj, 76-jara, estas denaska esperantisto; Giorgio Silfer, la alia aŭtoro, 67-jara, estis jam en 1969 kunfondanto de la literatura rondo «La Patrolo». La aŭtoroj respondecas

kune pri la enhavo ĝis 1993; pri la periodo de 1993 ĝis 2012 respondecas Carlo Minnaja. La du aŭtoroj prezentas nian literaturon kronologie en 54 ĉapitroj. Ĉiu ĉapitro havas propran kaj trafan titolon. La titolo de la unua estas: «De Ho, mia kor' al Mondo kaj koro – ĝeneralaj trajtoj de la unua periodo (1887-1921)»; de la dua: «Fajrontas Li interne – Zamenhof la iniciatinto»: ... de la kvindek-kvara: «Preter la papero – de scenoj al sondokunmetado ĝis

bloĝoj». La 54 ĉapitrojn pri literaturo – nocio kiel eble plej larĝe konceptita – sekvas *Referencoj, Glosoj, Bibliografio, Antologia parto (Poezio, Prozo), Indekso de bildoj, Indekso de verkoj, Indekso de Revuoj, Indekso de temoj, Indekso de personoj*; entute 189 paĝoj faciligantaj priserĉadojn kaj inspiriĝojn.

Do, almenaŭ laŭforme, ĉio estas en ordo: ni povas legi la libregon de la unua paĝo ĝis la 559a, kiel romanon, por ensuĉi la bazajn konojn pri nia literaturo; aŭ ni povas ĝin konsulti por trovi, laŭ bezono, verkojn kaj verkistojn.

Sed elmetiĝas pli tiklaj problemoj, se ni volas taksi la enhavon de tiu ĉi HEL.



– Unue, ni devus iel juĝi pri la komplet-eco de la verko: ĉu ni trovos ene ĉion, kion ni serĉas? La ideala kompleteco evidente ne eblas. Ĉi-tipa verko estas simila al biblioteko, kaj absolute kompleta biblioteko ne ekzistas. La esperanta literaturo estas jam tro granda por komplete listigi ĉiujn literaturaĵojn aperintaj – kaj malaperintaj – dum 125 jaroj. Aliflanke, ne ĉiuj eldonitaj tekstoj meritas eniri historion de literaturo. Kiu decidis pri la indeco de verkoj kaj verketoj eniri HEL-on? Se sinjoroj Minnaja kaj Silfer estus legintaj ĉiujn verkojn listigitajn en ĝi, ni rajtus diri, ke ili decidis. Sed ne eblas ĉion legi. Multajn literaturaĵojn ili povis koni nur pere de kritikaj fontoj: artikoloj, recenzoj, antologioj, la Interreto kaj antaŭekzistintaj literaturhistoriaj libroj. Ĉi-okaze la decido pri la «indecio eniri» grandparte dependis de kritikistoj kaj recenzistoj tre ofte jam mortintaj. Povis okazi, ke la aŭtoroj, kvankam ili konis iun verkon, taksis ĝin ne menciinda en HEL. Ili tiam agis laŭ siaj konscioj: tion mi ne riproĉus al ili. Ĝis nun oni malkovris dekon da verkoj, kiuj devus enesti, kaj ne enestas. Ni supozu, ke en kelkaj jaroj oni trovos centon de mankantajn verkojn! La *Indekso de verkoj* listigas ĉirkaŭ 2000 verkojn, do enestas almenaŭ 95% de la esperanta originala verkaro. El tio ĉi mi konkludas, ke tiu ĉi *Historio de esperanta literaturo* estas praktike kompleta, teorie kompletigota.

– Due, ni devus iel juĝi pri la kritika valoro de HEL. La legantoj ne volas sensukan libroliston; ili volas, ke la verkoj estu konigitaj kaj pritaksitaj interese kaj fidinde. Interese, tio estas tiel, ke la leganto ekhavu novajn konojn, ne nur tiujn, kiuj troviĝas sur ĉiuj librovendejaj slipoj. Fidinde, tio estas tiel, ke la leganto, kiu konas la libron, ne trovu en la pritakso malveraĵojn kaj kalumniajn misjuĝojn okulfrape anakronismajn, partieceajn, prudajn kaj

malicajn. Fidindeco estas subjektiva morala afero; pri fidindeco nur subjektive oni povas juĝi. Tiel juĝi mi povas nur per sondado kaj subjektiva opiniado. Mi devas serĉi en HEL aŭtorojn kaj verkojn konatajn, iel ŝiboletajn, kaj opinii pri la aŭtoraj prijuĝoj.

Plej bone mi konas min mem kaj miajn verkojn. En la *Indekso de personoj* mi serĉas mian nomon. Mi trovas «de Zilah, Eugène»-on inter «de Seabra, Manuel» kaj «de Zilah, Madeleine». Kia ĝoja surprizo! Ŝajnas al mi, ke la 30-jara sindediĉo de mia edzino al Esperanto estas agnoskita, oficialigita. HEL konsideras, ke **Madeleine de Zilah**, per *La Gazeto* kaj OSIEK, notinde kontribuis al la disflorado de la esperanta literaturo. Tian klarvidan honestecon mi ne atendis.

Mi legas poste tion, kion Carlo Minnaja diris pri mi kaj miaj verkoj: ĉio estas honesta kaj akceptinda. Min iom surprizis, ke *Kaj kiu pravas* «ne estas por malkleruloj, kiuj verŝajne nur la parton erotikan ĝuus; ĝi estas por filozofoj, kiuj demandas sin mem kiel la aŭtoro.» (p. 542a) Sed eble ankaŭ tio ĉi estas vera. Min kortuŝis kvazaŭ neesperita laŭdo, ke laŭ Carlo Minnaja, en *La Princo ĉe la hunoj*, «multajn terminojn li devis konstrui por detale priskribi objektojn ne apartenantajn al la eŭropa civilizo kaj do por kiuj esperanto ne havas jam pretan vorton; li ilin konstruis per skrupula lingva sento, tiel ke ili aspektas kvazaŭ de ĉiam hejmantaj en la lingvo.» (p. 542a) En la sama libro, ŝajne, mi «gloras justan, kvankam ŝtupe organizitan ŝtatan hierarkion». (p. 543a) Nu, jes, sed ĉu ekzistis en Azio, ne «ŝtupe organizita» ŝtata hierarkio en la 3a jarcento antaŭ Kristo? Eble, pro subkonscia premo, mi elmontris preferon al la justa. Estas ankaŭ menciita, ke mi estas «eseisto kaj recenzisto», kaj ankaŭ tio ĉi veras, eĉ se nenion konigas pri tri kvaronoj de mia verkaro. Resume: la teksto

dediĉita al mi estas fidinda. Ŝajnas al mi, ke Carlo Minnaja legis miajn librojn kaj forĝis pri ili memstaran opinionon.

Sed, ĉu tiu ĉi memstara inteligenta opiniado ekzistas pri ĉiuj aliaj aŭtoroj kaj verkoj? Por konvinkiĝi pri tio ĉi, mi serĉis ŝiboletan verkon en HEL. Temas pri la unue aperinta romano en nia literaturo: *Kastelo de Prelongo* de Henri Vallienne. Tiu ĉi romano havis maljuste detruigan kritikon en *Esperanto en Perspektivo*, en 1974, kaj de tiam preskaŭ ĉiuj blinde ĝin kondamnas. Mi trovis en HEL:

«Nur en 1907 aperas la unua longa romano: *Kastelo de Prelongo* de Henri Vallienne, kiu en 1908 publikigas la duan: *Ĉu li?*. Franco, tradukinto de *Eneido*, rapide gajnas al si la reputacion de plej granda stilisto, post Kabe. Li verkas imite al Alexandre Dumas

kaj la felietonoj de tiu epoko, tial li estas siaflanke aktuala, kaj povas fariĝi la unua kazo de «best seller» (vendfurorulo) en nia literaturo, kvankam Kabe ankoraŭ larĝe superas lin en la influo al la publiko.» (p. 6a)

En la 9a ĉapitro Henri Vallienne havas preskaŭ tri paĝojn, kaj *Kastelo de Prelongo* meritas sufiĉe detalan recenzon. La aŭtoroj de HEL bone reliefigas la tiaman bezonon de la Esperanto-movado havi longajn romanojn. Ni bone komprenas, ke la celo de Vallienne, «kuracisto, alnajlita al sia ĉambro jam ekde aprilo 1905 post grava atako de kormalsano», estis doni al la Movado tiajn romanojn, rapide kaj sen troa zorgado pri originaleco kaj profundeeco, kaj en lingvaĵo necese antaŭfundamenta. HEL ne silentas pri la lingvaj problemetoj en

*Kastelo de Prelongo*, sed ĝia konkluda frazo estas:

«La intrigo treniĝas tute impete, streĉoplene, la rapido en la legado estas nur ĝenata de la lingvaĵo, kelkloke (sed nur kelkloke!) fuŝa kvazaŭ de komencanto.» (p. 78a)



Carlo Minnaja

Vallienne eklernis Esperanton en 1902, nur 5 jarojn antaŭ la apero de *Kastelo de Prelongo* – li ja estis komencanto. Mi estas kontenta: la aŭtoroj de HEL ne kontentiĝis per blinda sekvado de tretitaj vojoj. Ankaŭ pri Vallienne HEL estas fidinda.

Nun mi kontrolu kion diras HEL, pri kelkaj verkistoj de mi bone konataj. Tuj apud mi, sur la paĝo 541a, troviĝas **Christian Declerck**. Pri *Tarokoj kaj epokoj*: «la ĉefa kvalito de

tiu ĉi romano estas la senhipokrita enpenetro en sin mem». Mi preferus tekston iom pli longan pri Christian Declerck, sed mi jam multfoje konstatis, ke ju pli profunda estas iu verko, des pli koncizaj estas ties recenzoj. Do, eble tro lakona, sed tamen fidinda mencio pri tiu ĉi aŭtoro.

Pri **Trevor Steele**: «Per naŭ romanoj kaj tri novelaroj en la lastaj tridek jaroj imponas aŭstraliano Trevor Steele (1940[1970])». Listigi tiom da verkoj okupas 3 paĝojn (p. 537a-540a), kaj, eĉ tiel, apenaŭ restas loko por profundaj analizoj. Ni tamen ekscias, ke «ideoj kaj stilo eminentis» en *Sed nur fragmento* (1987); ke «kelkfoje oni malfacile distingas la rakontojn de la protagonisto disde tiuj de la aŭtoro mem»; ke «apartaĵo estas la klopodo

transskribi en diversaj proksimumaj esperantumoj la misprononcadon de la germana fare de diversnaciaj negermanoj. Iuj recenzantoj konsideris tion amuza virtuozaĵo, aliaj fiasko»; ke, en *Kaj staros tre alte...* (2006), «romantikaj promenadoj [...] certe estas tute fantaziaj se komparataj al la fakto ke en la unua jarcento junulinoj tute ne ĝuis tian liberecon»; kaj ke «la stilo estis tiu de aŭtoro fascinata de la domo de Jeŝu: pasia, sed flua, trankvila, kun granda kapablo utiligi la latentajn potencialojn de la lingvo, kaj tre respektama al la baza vortaro»; ke, en *Konvinka kamuflaĵo* (2014), «la lastaj ĉapitroj estas filozofiaj, kiel ĉe persono kiu sentas, ke li diris ĉion»; ke, en lia tuta verkaro «certa sento de supereco de la blanka raso estas videbla en kelkaj fragmentoj». Nu, ĉio ĉi ŝajnas fidinda, eĉ se la prijuĝoj ne ĉiam estas tre nuancaj.



Giorgio Silfer

### Sen Rodin (1932[1940])

aperas en la ĉapitro 33, kie oni mencias, ke noveloj liaj aperis en diversaj revuoj, kaj, ke la eldono de *Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj* okazis duonjarcenton poste, en 2006. Ni retrovas lin en la ĉapitro 53, kie la enhavo de *Bildoj pri Norda Lando ...* estas prezentita, sed nenio estas dirita pri lia arto. Bedaŭrinde! En 2006, pro tiu libro mi ekatentis pri la tipe suda muziko de lia prozo. Post ellegado de multaj libroj verkitaj en UEA-dialekto, estis vera senpeziĝo por mi konstati, ke ekzistas ankaŭ tia lingvaĵo en Esperantio.

En *Nu kaj do?* (2010), «pri esperanto kaj esperantistoj li tute saĝe kaj trankvile komentas, certe kun la seniluziĝo de okdekjarulo

kiu esperantistiĝis okjara, sed kun la certeco pri la pluresto de la esperanta arto. [...] La flua rakontarto de Sen Rodin, kiu ĉiam havis esperanton kiel unuan familian lingvon, povas esti similigita al la stilo kaj humuro de Szilágyi kaj Rosbach, sed kun pli multe, kaj da optimismo, kaj da prudenta rezignacio pri iamaj mitoj kaj revoj.» (p. 529)

### Júlia Sigmond (1929[1956]), verkistino,

kiu publikigis du ĉarmajn librojn mallongajn: *Mi ne estas Mona Lisa* (2001) kaj *Nomoj kaj sortoj* (2011), alportis al Sen Rodin pasion kaj novan inspiron. La paro bele esprimis sian amon per komune verkita longa romano: *Libazar' kaj Tero*. «En nia literaturo apenaŭ estas verkoj kie du aŭtoroj tiel kongrue integriĝas; ĉe Sen Rodin kaj Júlia Sigmond tio okazas perfekte, sekvo de ilia integriĝo en la privata vivo.» (p. 530a)

Mankas fotoj en HEL pri Júlia Sigmond kaj Sen Ro-

din. Mi kompreneble ŝatus trovi pli da analizo, sed tio kion mi trovis pri la verkista paro estas vera kaj fidinda.

La ofte tro severe kritikata aŭtoro, la «plej produktiva prozisto de la lasta kvaronjarcento» **István Nemere** (1944[1960]), meritas kvar paĝojn en HEL. Sed «grandan influon al la literaturo li, objektivite, ne havas; se kompari kun Valano, li tamen havas enorme pli vastan temaron kaj tuŝas multe pli la animon de la leganto ol la kordojn de la kritikisto». (p. 394) Li «majstras la leĝeran literaturon, kiu tiom mankas al nia lingvo, strebanta al ĉefverkoj». Bedaŭrinde, la troa insisto pri

liaj lingvaj eraretoj – kiujn ununura serioza provlegado povus ripari – ne lasis lokon por analizi lian genian kreadon de kunmetaĵoj. Tamen oni devas «atribui al Nemere lokon inter niaj plej gravaj verkistoj». Multo estus dirinda pri Nemere, sed tio kio estis dirita ne estas maljusta. La legantoj de HEL ne estos trompataj.

Eĉ pli ofte kaj pli rabie kritikata aŭtoro estas **Karolo Piĉ** (1920[1937]-1995). Li havas 5 paĝojn, apud naturalisma deklaro pri Rikardo Sulco, kiu asertas, ke «danĝeras la principo, ke ne estas gvida la uzo, sed la logika analizo». Tamen, nenio sur la 5 paĝoj (441a-446a) ŝajnis al mi aparte maljusta aŭ maltolerema, eĉ se la influo de Piĉ sur nian literaturon ŝajnas al mi pli grava, ol tiu konfesita de la aŭtoroj de HEL. Oni rajtas fidi la informojn ankaŭ pri Piĉ.

Mi sondis la artikoletojn en *Historio de la Esperanta Literaturo* pri deko da aliaj aŭtoroj de mi malpli konataj. Mi trovis informojn por mi novajn – nome pri la literaturaĵoj de **Gerrit Berveling** –, sed nenion mi trovis, kio estus vundanta mian justosenton. Mia konkludo estas, ke tiu ĉi HEL estas fidinda.

Ĉu mi nun serĉu iun «kadavron en la ŝranko»? Kial ne? La legantoj de LG certe memoras pri impertinenta pamfleto de **Jorge Camacho**, aperinta en 1993, kontraŭ gesinjoroj Silfer. Mi legis tiam la broŝureton, kaj, ne ŝatante tiaĵojn, mi rapide forgesis ĝin. Nur leginte recenzon pri HEL, verkitan de Christian Declerck, mi eksciis, ke Carlo Minnaja kaj Georgio Silfer ne juĝis tiun paskvilon literaturaĵo enmetenda en sian verkegon. Eble tial, ke ĉe Camaĉo, glorata pro liaj poeziaĵoj laŭlonge de 5 paĝoj, «klopodoj pri satiro, kvankam iufoje amuze spicita per klerca tono, estas malpli sukcesaj.» (p. 496) Mi est-

us trovinta «kadavron», se Jorge Camacho estus tute «forgesita» en HEL. Sed male, li estas tre memorigita, eble por forigi ĉian «kadavro-odoron». Mi ne scias, ĉu tio, kio estas pri li dirita estas fidinda: mi ne bone konas liajn poemojn.

Fine de HEL, troviĝas 80-paĝa antologio: bonaj tekstoj de bonaj aŭtoroj. Mi ne estus metinta vivantajn aŭtorojn en tian teksto-kolekton. Mi eĉ ne estus farinta antologian parton, ĉar la loko, kiun tiu ĉi okupas, estintus sufiĉa por inkludi la tradukaĵojn de niaj plej sukcesaj tradukistoj. La esperanta literaturo – same kiel la literaturoj de ĉiuj kulturlingvoj – enhavas ankaŭ la mondkulture valorajn tradukaĵojn, kiuj pli influas la literaturan lingvon, ol certaj malpli valoraj originalaĵoj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi mendis 2 ekzemplerojn de *Historio de la esperanta literaturo* ĉe la libroservo de UEA. Hieraŭ la libroservisto min avertis, ke «bedaŭre, momente la libro kiun vi mendis estas elĉerpita. Tuj post ricevo de nova stoko, mi informos vin pri la nova prezo.» Sed, eĉ se la prezo altiĝos, la libro restos akirenda; multaj esperantistoj jam taksis ĝin pozitive. De nun – kaj probable dum pluraj jardekoj – *Historio de la esperanta literaturo* estos nemalhavebla manlibro de ĉiuj kiuj interesiĝas pri nia literaturo.

*Eugène de Zilah*

Júlia Sigmund  
Sen Rodin

*Libazar' kaj Tero*

Kvarmana sonato dutonala

MONDIAL, Nov-Jorko, 2013; 451p. Prezo: 29 €  
Havebla ĉe LG